



DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (928) • 2018 •



LOVE



Vidu paĝon 19

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

La unuiĝintaj eklezioj	3
Jesa	6
70 jaroj kun virinaj pastoroj	8
Tonsurdaj, kolorblindaj kaj ateistoj	9
La testamento de Luther	10
22-a Ekumena Esperanto Kongreso	16
Aliĝintoj	17
Ne ĉiam envi la riĉecon de la aliuloj	18
Agado en Neubrandenburg	20
Informetoj	22
Nekrologoj	23
Salto gaje mia kor'	24

Redaktoraj vortoj

La nuna numero enhavas plurajn artikolojn kiuj iel temas pri virinoj, tute neintence sed eble taŭga, kiam baldaŭ okazos la internacia virina tago. La lastajn monatojn ni aŭdis raportojn pri protestoj de virinoj en formo de #METOO-movado. Multaj similaj protestoj sekvis en diversaj profesiaj rondoj, kaj tio montras ke mankis kaj mankas respekto en nia socio, ne nur rilate al sekso, sed rilate ankaŭ al raso, religio kaj aliaj grundoj. Dum jarcentoj okazis multaj disigaj agadoj ene de kristanismo. Tiuj disigaj agadoj ne nur baziĝis sur malsamaj opinioj sed estis ofte akompanataj ankaŭ de ne-respektoj. En la apuda artikolo estas priskribite nuntempaj unigaj klopodoj fare de multaj eklezioj. En tiu laboro oni devas akcepti ke troviĝas diversaj opinioj. Samtempe estas grave ke oni respektas unu la alian, ne-forgesante ke ni trinkas el la sama fonto. “Kristo kaj la Skriboj estas nia komuna fundamento, preter niaj diversaj sentoj kaj travivaĵoj” skribas Philippe Cousson. ☞

La unuigintaj eklezioj

Philippe COUSSON, FR


Protestantismon oni priskribas kiel tre diversa, kun multaj “denominacioj”. Tiu fenomeno estas ligita al historio, personoj kaj konvinkoj. Sed interne de protestantismo troviĝas ankaŭ emo al unuigo, re-unuigo.

Tiu procezo havas plurajn eblajn radikojn : unue en la historio la ŝtataj instancoj, poste la misia agado kaj fine la teologiaj diskutoj.

Al kelkaj princoj kaj regantoj estis neakceptebla la tiama disiĝo. Ili do instigis, devigis la unuigon.

Kiam la misiistoj konsciis ke la proklamon de la Evangelio kontraŭdiras la disiĝo kaj disputoj, ili komencis se ne unuigi almenaŭ ne interbatali.

La evoluo de teologio kondukis al konstato ke la disigaj teologiaj punktoj ne estas tiel disigaj.



Unu el la unuaj plej notindaj disigaj momentoj estas la kolokvo de Marburg (1529) kie la tiamaj Reformatoroj konstatis ke ili konsentas pri multegaj aferoj, sed ke pri la Sankta Manĝo ili ne povas akordiĝi. Luther diris ke ili ne “havas la saman spiriton”. Tiam la disiĝo inter reformitoj kaj luteranoj efektiviĝis. Ĝi fakte validis ĝis la Konkordo de Leuenberg en 1973 (vidu apartan tekstokadron). Tamen pluraj eklezioj de la du branĉoj daŭre malakceptas tiun tekston.

Same kiel la kredkonfeso de Aŭsgburgo (1530) unue celis al proksimiĝo kun katolikoj kaj rezultis en difiniga teksto por luteranoj, instige de la elektoro Frederiko 3-a de Palatinato la katekismo de Heidelberg (1563) celis al proksimiĝo inter reformitoj kaj luteranoj sed rezultis en unu el la difinigaj tekstoj por reformitoj.

Alia princo volis kaj efektivigis unuigon inter reformitoj (kiel li) kaj luteranoj (kiel lia popolo). Temas pri Brandenburgo kiu poste fariĝis Pruslando. En tiu germana princlando la princo estis reformito kaj la plimulto de la loĝantaro luteranoj, kun la notinda escepto de la rifuĝintoj.

En 1798 Frederiko Vilhelmo 3-a fariĝis reĝo. Li strebis al la unuigo de la protestantoj en siaj teritorioj. La

teologo Frederiko Schleiermacher proponis ideojn por konstitucio de tiu eklezio en 1808 kaj la reĝo fine de 1817 estigis la novan eklezion. Sed ne ĉiuj paroĥoj eniris la novan unuiĝintan eklezion, sekve poste kiel oni ofte vidos en aliaj samaj cirkonstancoj anstataŭ du eklezioj estis tri.

Kelkajn monatojn pli frue unuiĝis la eklezioj en la duklando de Nassau.

Samtipaj unuiĝoj okazis ekde fino de la 19-a jarcento en aliaj landoj sed sen interveno de la ŝtatoj, kiel ekzemple en 1918 (antaŭ unu jarcento) en Ĉeĥio, konsistigante la Ĉeĥofratan Eklezion Evangelian. Antaŭ nelonge okazis tiaj unuiĝoj en Nederlando post la procezo “Kune sur la vojo”, en Belgio, en Francio (2013).

Tute alia tipo de unuiĝo de protestantaj eklezioj instige de la ŝtato okazis en la 20-a jarcento dum la diktaturo de Mobutu en Zairio, kie ĉiuj protestantaj komunumoj devis ariĝi por konsistigi la Eklezion de Kristo en Zairio. Kiam finiĝis la diktaturo de Mobutu ne ĉesis tiu unuiĝinta eklezio sed daŭris en posta laŭnome demokrata Kongo.

Dua kategorio estas la unuiĝoj en la daŭro de la 20-a jarcento de, laŭ la kazoj, presbiterianaj, kongregaciaj, metodistaj, “disĉiploj” aŭ aliaj “liberaj” eklezioj en Britio, Aŭstralio, Kanado (unua en 1925) aŭ Usono.

Kiam en tiuj unuiĝoj enestas anglikanoj, tiam oni parolas pri kvara kategorio, ĉar tiam ĝenerale enestas la episkopa sistemo : Suda Hindujo 1947

La **Leuenberg-Deklaracio** (aŭ Leuenberg-Konkordo) estas ekumena dokumento adoptita en 1973 en Leuenberg (proksime al Baselo en Svislando) fare de la ĉefaj eŭropaj luteranaj, reformitaj kaj unuiĝintaj eklezioj. Surbaze de ĉi tiu interkonsento, la eklezioj konsentas pri multaj gravaj teologiaj temoj kiel kristologio, antaŭdestino, komunio kaj pravigo. La ĉeestantaj eklezioj formis “Leuenberg Church Fellowship” kiu de post 2003 nomiĝas “Komunumo de Protestantaj Eklezioj en Eŭropo”.



La bazo por trovi unuecon konsistis el tio pri kio oni esence jam konsentis. Samtempe oni povis konstati ke la kredokonfliktoj reflektitaj en la malnovaj ekleziaj doktrinoj ne estas nuntempe aplikeblaj. Ĉi tio rezultis al solvo al la doktrinaj luktoj, kiuj apartigis la luteranajn kaj reformitajn ekleziojn dum 450 jaroj.

La laboro por kunlaboro kaj unuiĝo kun pli da eklezioj daŭras. Hodiaŭ ĉirkaŭ 100 eklezioj estas membroj.

(la procezo komenciĝis en 1908), Norda Hindujo 1970.

Fine estas kvina kategorio kiam la unuiĝintaj eklezioj kunigas denominaĵojn el la sama konfeso (reformita-presbiteriana aŭ luterana) kiuj estis disaj pro historiaj kaŭzoj.

En kelkaj kazoj, tiuj unuiĝintaj eklezioj asertas ke la procezo ne finiĝis. Tial ili nomas sin “unuiĝintaj” eklezioj, esperante aligi aliajn komunumojn, ekzemple en Aŭstralio.

Ĝenerale la unuiĝintaj eklezioj konservas la ligojn kun la diversaj konfesiaj mondaj organizaĵoj.

Ĝis nun mi restis en la protestanta mondo. Tamen, tiu unuiĝanta elano ricevis fortan puŝon en la misia konferenco en Edinburgo 1910, kie la

misiistoj konstatis la sencecon de la konfesia disputado dum la proklamo de la Evangelio.

En la sekvo de tiu konferenco naskiĝis fluo da kontaktoj kiu kondukis en 1948 al la konsistigo de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en kiu ankaŭ partoprenas la ortodoksiaj eklezioj kaj kun kiu parolas kaj kunlaboras la Roma Katolika Eklezio.

En nia eta esperantista kristana movado estis kelkaj ligoj laŭkonfesiaj, sed mi estas feliĉa ke nia KELI estas de la komenco “unuiĝinta” kristana asocio. Por ni, Kristo kaj la Skriboj estas nia komuna fundamento, preter niaj diversaj sentoj kaj travivaĵoj.



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

10. februaro

Kompatema Sinjoro, ne estu senenhava sono ke mi estas Via disĉiplo. Donu ke aliaj rimarku tion. Faru min sincera, afabla, kompatema kaj amanta. Sanktigu min, por ke ili ekkonu, ke estas feliĉo aparteni al Vi.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Jesa

Reagoj post legado

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La jena artikolo estas ĉerpo el studtasko kiun mi faris dum miaj interlingvistikaj studoj lasttempe. Unu el pluraj temoj estis nuntempa esperanta literaturo. Interesis min la libro *Jesa*, verkita de la hungaro István Nemere.

En malgranda loko apud dezerto aperas juna virino. La enloĝantoj ne povas ne reagi al ŝi ĉar ŝi iel provokas ilin en iliaj konservativaj sintenoj aŭ pridubas iliajn honestojn. Al tiuj, kiuj bezonas ian apogon, ŝi donas apogon. Al aliaj ŝi estas ia minaco. La nura apero estas provoko. Ŝi venas kaj foriras mistike kaj ŝajne ne estas sub la kutimaj fizikaj leĝoj.

La tuta ideo de la libro *Jesa*, estas en nuntempa situacio aperigi Jesuon kiel virino, kaj provas imagi kio okazus se Jesuo aperus inter ni. Do la libro ankaŭ estas iom provoka al leganto. Kiel mi reagus se mi estus en la sama situacio kaj apud mi, inter ni, aperus homo, kiu eble povus esti Jesuo?

La jena eseo pritraktas la romanon *Jesa*, kiu estas iom religia kaj samtempe sciencfikcia. La romano estas verkita de la konata verkisto István Nemere. Li estas hungara verkisto kaj tradukisto, kiu naskiĝis en 1944 kaj esperantistiĝis en 1962 dum siaj gimnaziaj jaroj; ke li ĉefe verkas en la hungara lingvo, sed ankaŭ tre aktive verkas en Esperanto, ke liaj verkoj estas tre variaj, ekzemple krim-



romanoj, sciencfikciaj libroj, am-romanoj kaj fikciaj libroj pri politikaj kaj sociaj problemoj. Laŭ lia retpaĝo aperis jam pli ol 500 libroj de post 1974 kaj el tiuj aperis tradukaĵoj en 12 lingvoj. Pri lia grandkvanta produktado atestas inter alie István Ertl per la vortoj ”plurkampa rekordulo” kaj per similaj vortoj Baldur Ragnarsson per ”La rekordulo de nia literaturo” kaj je la fino de sia recenzo Ragnarsson aprezas la produktemon de Nemere, de kiu Esperantio profitas ”Jam pli ol tridek kaj duonon da jaroj Nemere ne ĉesis mirigi la Esperantistan legantaron per sia produktemo, sed li meritas pli ol primiron, li meritas senrezervan admiron”.

Similaj atestoj pri lia produktado troviĝas ĉe Melnikov en lia Gvidlibro tra Esperantio kiu ankaŭ mencias ke la Esperanta Pen-centro en 2007 nomumis

lin kandidato de Nobel-premio pri literaturo. Ĉe Minnaja & Silfer en ilia Historio de la Esperanta Literaturo, Nemere estas prezentita tiel, ke li estas "la plej produktiva prozisto de la lasta kvaronjarcento". Perla Martinelli (en Minnaja & Silfer) priskribas lin "matura aŭtoro kun riĉa vivosperto kaj sentemo kunigitaj al sinteza kapablo".

Laŭ Minnaja kaj Silfer, ne multaj personoj opinias ke Nemere estas escepta aŭtoro. Eble kelkaj unuopaj verkoj estas laŭdataj, sed pli multe abundas la kritiko. La kvanto da libroj, kiu estas nekredebla kaj krome la verkoj en tiom da variaj temoj, verŝajne klarigas ke ili ne profundigās en la temon aŭ personan psikologion.

Ertl, kiu mem estas hungaro, kontrastigas la produktadon en la hungara kaj en la esperanta lingvoj dirante ke Nemere ne estas same alte taksata en sia hejmlando kiel en Esperantio, kaj laŭ la propra eldiro de Nemere tio eble dependas de tio ke tradukitaj en fremdaj lingvoj estas nur la plej bonaj libroj.

En sia mallonga membiografio sur la retpaĝo li skribas "Mi skribas, ĉar mi ne povas fari ion alian. Mi skribas, ĉar legantoj ofte konfirmas, ke ili bezonas la historiojn, kiuj naskiĝas en mia menso".

La historio estas situanta en malgranda loko apud dezerto kie aperas juna virino, unu fremdulino. Al bonaj homoj ŝi kunportas bonaĵojn, al hipokritoj kaj malbonuloj ŝi kunportas pridubojn kaj maltrankvilecojn ĉar ŝi ŝanceligas la kutiman ordon.

La verko estas kaj scienficia kaj iom

religia, ĉar la historio metas Jesuon, en virina apero, en modernan tempon. Kredantoj povas esplori sin mem kaj siajn sentojn, identigante sin en la rolon de diversaj aperantaj personoj en la romano. Facile oni opinias pri la okazaĵoj antaŭ 2000 jaroj, kaj supozeble ĉiu mem orientigis sin rilate al la tiutempaj fiuloj. Sed kiel ni agus hodiaŭ, ne sciante ke en la apero de alia persono kovras sin Jesuo? Uzante la vortojn de Declerck "La temo de la libro estas 'ĝusta vivoceleto', do: bonintenceco kaj homeco, helpemo, justo, sincero. Korkreskigo, fine".

Minnaja kaj Silfer opinias ke la libro estas "[e]difa romano, kie oni trovas ankoraŭfoje la moralajn esperojn de la aŭtoro pentritaj tra liaj protagonistoj".

Kiam Nemere reskribas la okazaĵojn pri Jesuo tiel kiel ili estas priskribitaj en la evangelioj en la nova testamento, li espereble havas iun celon alian ol nur distri la legantojn. Li refaras la historion en moderna tempo en malgranda urbeto kaj la leganto povas eble retrovi sin en iu rolo de la aperintaj homoj. Laŭ la evoluo de la romano, ni homoj estas la samaj hieraŭ, hodiaŭ kaj verŝajne ankaŭ morgaŭ. La fremdulino spertas pli malpli la saman sorton kiel Jesuo spertis kiam li iris sur nia tero.

La verkisto skribis la romanon en 2009, estante 65-jara. Ĉu eblas ke la verko ankaŭ estas parto de lia propra pensado pri religio, pri nevideblaj eblaj fenomenoj, pri estonta morto kaj ebla senmorteco. Eblas ke la verko estas rezulto de lia emo plibonigi la mondon.

La produktado de Nemere estas laŭdinda. Li produktas multe da

esperantaj libroj al la gajno de legantoj esperantistaj. Certe la verkoj de Nemere, inter ili Jesa, ne kontribuas/kontribuos al la riĉigo de la internacia lingvo. La plej granda valoro de la libro Jesa verŝajne estas tio, ke ĝi riĉigas la esperantan literaturon alimaniere, per ankoraŭ unu facile legebla literaturaĵo.

La varia produktado de Nemere donas eblecon al ĉiu esperantisto trovi iun interesan libron. Ne ĉiu esperantisto estas esperantlingve lerta kaj ne ĉiam profunde pensema, kaj por tiuj Jesa estas libro kiu povas plenumi la taskon evoluigi la lingvoscion aŭ simple dum mallonga tempo distri la leganton, eble en tramo survoje al la laboro. La libro havas bonan dikecon kaj pezon por esti facile kunportebila.

Tamen, la libro Jesa povas kunporti iom da pensigaj pensoj precipe se la

leganto estas iom kredema, ĉar la temo, metante virinan Jesuon en modernan tempon, povas levi demandojn ĉe la leganto pri propra sinteno kaj agado, kaze se oni mem renkontus fremdulinon.

Eble la verko estas rezulto de la emoj plibonigi la mondon per ĵus tiu maniero, kiun Nemere regas, nome verki librojn.

Restas al mi, kiel leganto, plenumi mian rolon legi ĝin. Tiel mi atingas du celojn: mi plibonigas mian esperantan lingvoscion kaj samtempe subtenas la daŭran eldonadon de esperantaj libroj. Ambaŭ gravaj por la pluekzisto de nia lingvo.

Krome, legante Jesa mi havas eblecon iom pripensi miajn proprajn pensojn kaj opiniojn pri mia kredo en nedeviga formo.

☞

70 jaroj kun virinaj pastoroj

Bazita sur gazeta raporto

Tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

En novembro 2017, la Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio memorfestis la 70-a datrevenon de la pastora ordigo de virinoj. En 1947, la eklezio, verŝajne kiel unu el la unuaj eklezioj en Eŭropo, ordigis du virinojn kun la samaj rajtoj kaj devoj kiel la masklaj pastoroj.

Ekde la komenco 1920, la sakramento de la Vespermanĝo de la Sinjoro estis okazigita fare de kaj viroj kaj virinoj kaj ankaŭ fare de laikoj, laŭ la modelo de la mezepokaj husanoj. Ĉi tiu praktiko,

kiu esprimas la unuecon de pastoroj kaj laikoj antaŭ Dio, ankaŭ apogis la saman staton de viroj kaj virinoj ene de la preĝejo, inkluzive de sakramenta servo. Nuntempe, aldone al inaj predikantoj, katekistoj kaj pastoraj helpantoj en la klerika pozicio, troviĝas ĉirkaŭ 50 % de virinaj pastoroj kun pastora aŭ diakona ordigo en la eklezio.

La memorfesto okazis la 25-an de novembro 2017 en Prago-Dejvice, kie la unuaj tri patriarkoj de la eklezio estas enterigitaj. ☞

Tonsurdaj, kolorblindaj kaj ateistoj

Tradukita kaj redaktita de Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Bazita sur gazeta artikolo en 2013 fare de Tuve Skånberg,
membro de Parlamento kaj Direktoro de Clapham Institute

Tion, kio estas plej kara en la vivo, ne povas pruvi la scienco. Tio estas ekster ĝia kapablo komenti, ekz. la belecon de pentraĵo. Ĉu peco de muziko estas bela, ĉu amo ekzistas aŭ pri la zorgo de Dio?

Ekzistas homoj, kiuj ne havas la eblecon sperti ion ajn de tio. Iuj estas tute kolore blindaj, kelkaj ne povas distingi inter flava kaj blua koloroj, aliaj ne inter ruĝa kaj verda. Homoj kun denaska muzika malfunkcio ne povas aŭdi la diferencon inter malgrandaj intervaloj, kiel duontono, sed bone pli grandajn tonajn intervalojn.

Esploristoj taksis, ke ĉirkaŭ 10 procentoj de la loĝantaro havas malordon en la kapablo senti empation, kompaton kaj montras unu aŭ pli da karakteroj kiuj estas forte asociitaj kun psikopatio. Sed neniu, kiu havas koloran blindecon, muzikan malfunkcion aŭ mankon de empatio povus kredeble nei la ekziston de beleco en arto kaj muziko, aŭ la realaĵo de amo. Kvankam neniu el ĉi tio povas esti pruvita.

Ĉu Dio ekzistas aŭ ne, simile ne povas esti science pruvita. Pri tio kaj kredantoj kaj ateistoj samopinias. Sekve, estas absurde kiam ateistoj volas postuli ke ilia nekapablo kredi je Dio estu normativa. Kvazaŭ sekulara socio, socio sen religio, estus valore aspiri.

La nombro da homoj en la mondo,

kiuj diras, ke ili ne povas kredi je Dio aŭ en vivo post la tera vivo, estas tre malgranda. Esploristoj taksas ke pli ol 90 % de la monda loĝantaro kredas je Dio aŭ pli alta potenco.

En la medio, la scienca esplorado en la 20-a jarcento, estis la plej elmontrita al racia kritiko pri religio. Tamen, la plej multaj esploristoj estas kredantoj. 75 % de ĉiuj sciencistoj en la mondo kredas je Dio, estimas la *Religion Watch Newsletter* (www.rwarchives.com). Eĉ en la plej raciisma esplora medio de la 20-a jarcento, la usonaj universitatoj, la di-kredo ne malkreskis dum la lastaj cent jaroj. Esploro farita 1914, kaj ripetita en 1996 montris pli malpli la samajn nombrojn; 40 % kredis je iu dio.

Stephen Jay Gould, elstara evoluciobiologo, asertas en sia libro ke kristana kredo povas perfekte kombiniĝi kun la rolo esti distingita sciencisto. Li deklaras, ke multaj el la plej elstaraj sciencistoj kredas je Dio: “Aŭ duono de miaj kolegoj estas ege stultaj, aŭ perfekte eblas kunigi Darwinismon kun konvenciaj religiaj kredoj – kaj same eble kunigi ĝin kun ateismo”.

Estas same absurda lasi ateistojn esti la arkitektoj de la nova sekulara socio kiel havi tonsurdaj al muzikrecensitoj, kolore blindaj al artaj kritikistoj kaj neempatiuloj al profesiaj prizorgantoj.



La testamento de Luther

Prelego dum la kongreso en Zöblitz 2017

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

La historio de la testamento de Luther komenciĝas en la jaro 1525. En tiu ĉi jaro estis tragika, nigra ombro super Germanio.

Unue okazis nacia tragedio. En la granda germana kamparana milito estis mortigitaj centmil kampanaroj, kaj okazis la ekzekuto de Thomas Münzer.

Due okazis dinastia funebro: mortis Frederiko la Saĝa. Li estis la fondinto de la wittenberga universitato, iama imperiestra-kandidato de la papo, kiu dum sep jaroj, ĝis la morto, helpis la reformacion, rekonis la gravecon de Luther kaj akceptis lian instruon.

Tria, eĉ pli neatandita afero: Luther edziĝis! Luther antaŭ 20 jaroj forlasis la Aŭgustenan ordenan monaĥejon, sed restis fidela al sia monaĥa ĵuro.

En la 1520-aj jaroj ni trovas plurajn skribaĵojn de Luther, en kiuj li argumentas favore al la geedziĝo, kaj atakas celibaton. En unu loko tion li skribas: ankaŭ el religia vidpunkto la plej altnivela stato de la homa vivo estas la geedziĝo.

La edzino estis Katharina von Bora, antaŭa monaĥino, kiu post la forlaso de sia ordeno loĝis ĉe la urbestro Lucas Cranach en Wittenberg – tie ili ekkonis unu la alian.


Estis surpriziga la decido de Luther, ne ĉiuj ĝojis pri tio. La bona amiko Melanchthon kun granda maltrankviliĝo sentis, ke certe Katharina estis tiu, kiu perforte postulis la geedziĝon. Li skribis

en letero pri Luther: “En la nuntempa stato la germana nacio estus bezonanta lian tutan prudentecon kaj forton”.

Sed multaj signoj montras, ke Luther serioze kalkulis pri la ebleco de kaptado kaj ekzekutado, ĉar dum pluraj jaroj li jam estis sub imperia anatemo.

En aprilo 1524 estis imperia konsilio, kaj denove estis temo la herezula leĝo. La leĝo jam longe ekzistis, kaj la konsilio urĝigis, ke ili jam vere devus plenumi, realizigi ĝin.

La proksima martira morto ankaŭ donis al Luther teologian penson: li sentis, ke li devas atesti siajn instruojn



antaŭ la tuta mondo per iu kuraĝa reformatora ago.

Printempe (en la jaro 1525) li skribis en letero al iu amiko: “Nun jam kaj la sinjoroj kaj la pastroj, kaj la kamparanoj estas kontraŭ mi kaj minacas min per morto. Se ili estas tiel malsaĝaj – estu, sed tiam mi klopodos, ke la fino de mia vivo trovu min en geedza stato, en Dio-ordonita geedza stato”.

Kaj ni ne forgesu la homan vidpunkton: Luther estis viro, 42 jara, kaj kiam li elektis Katharina, li certe pensis ankaŭ pri siaj propraj vivo kaj feliĉo.

Al kiu Luther volis lasi heredaĵon?

Luther havis ses infanojn: tri filojn kaj tri filinojn (unu filino en la bebo-aĝo, unu 13 jar-aĝa mortis).

Ni vidu la infanojn laŭ la ordo de iliaj naskiĝoj:



- Johann naskiĝis en junio de 1526, mortis en 1575 (49 jarojn vivis), edziĝis al la filino de la reformatoro Caspar Cruciger.
- Elisabeth naskiĝis en 1527 kaj bedaŭrinde mortis duonjar-aĝe.
- Magdalene naskiĝis en 1529, mortis 13 jar-aĝe en 1542.
- Martin naskiĝis aŭtune 1531, vivis nur 33 jarojn, lernis teologion, sed estis malsanema, neniam laboris en eklezia posteno kaj ne havis infanojn.
- Paŭl naskiĝis en 1933, kaj mortis en 1593, estis kortega kuracisto en Gotha kaj poste en Dresdeno. Li havis ses infanojn, kaj inter ili Johann Ernst Luther estis pastoro, kiel la avo.

Pri kio Luther volis decidi?

Ili ricevis la Nigran Monaĥejon de Frederiko la Saĝa, kiu ankaŭ decidis, ke ĝis la fino de la vivo de Luther, ili ne devu pagi imposton. Ili povis uzi la domon, sed tiu ne estis ilia havaĵo.

Luther ricevis 200 guldenojn kiel “salajro” de la princo, kaj ankaŭ donacojn (pokalojn, juvelaĵojn).

Dum la jaroj ili aĉetis unu grandan kaj unu malgrandan ĝardenon, kaj ili ankaŭ aĉetis la farmon de la frato de Katharina en Zülzdorf (antaŭe Zolls-dorf), kiu fariĝis ilia dua hejmo.

Fine en 1541 ili aĉetis dometon, la tiel nomatan Bruno-domon en Wittenberg – el la testamento ni scias, ke tiun ĉi domon Luther volis kiel hejmo al sia edzino kaj infanoj post sia morto.

Nun jam ni scias, al kiuj li volis heredigi, ankaŭ tion ni scias, pri kio li

volis decidi, do venas la sekvonta demando: kial?

Kial Luther volis skribi testamenton?

Estis du gravaj kialoj: malsanoj kaj juroj.

Malsanoj: Luther ne estis sana homo kiel pro la portretoj ni pensus.

La plej grava malsano rilatis al la funkciado de la stomako kaj la reno – verŝajne pro la monaĥa vivo en Erfurt, kie li ofte kaj senorde faris fastojn, kaj kuŝis sur malvarmaj ŝtonoj inter mal-sekaj muroj.

Lia fortega mensa laboro kaj alta sangopremo estus la kaŭzo de liaj longaj (ofte daŭris dum semajnoj!) kapdoloro, kaj orel-zumado. Pro tio li ofte nek legi, nek skribi povis, eĉ la lumo vundis liajn okulojn.

Sed li havis ankaŭ alian problemon: ekde 1532 ĝis la morto, do preskaŭ dum unu kaj duona jardeko estis malfermita vundo sur lia maldekstra kruro – laŭ la tiama principo ili sentis, ke tiel estas plej bone, se tiu vundo ne saniĝas, do perforteme kaj artefarite ili tenis, tenadis tiun ĉi vundon malfermita.

Tiuj ĉi malsanoj tiam suferigis lin plej multe, kiam li estis for de Wittenberg, de sia hejmo kaj de sia propra doktoro.

Tiel okazis en 1537 en Schmalkalden – tiam li devis dikti sian unuan testamenton.

Nur mallonge mi ŝatus mencii tion, kiel interesaĵo. En 1534 nova papo, Paolo la tria eksidis sur la tronon. En la printempo de la jaro 1536 li kunvokis konsilion al la pentekosto la sekvontan jaron (do 1537), kaj li skribis kiel celo de la konsilio: refari la eklezian pacon

kaj ekstermi la herezulecon. Poste eĉ pli konkrete li skribis, ke la temo estos la neniigo de la “pesta lutheranismo”.

Jam en 1530 estiĝis la Unio de Schmalkalden por defenda celo, kaj en 1537 Johano Frederiko, saksa princo elektito kunvokis la membrojn, ke ili decidu ĉu ili partoprenu aŭ ne, se ili ricevus inviton al la koncilio. Li ankaŭ ordonis al Luther, ke kun liaj kunlaborantoj kunmetu la principojn de la evangelia kredo.

Luther, jam malsane, iris al la kunveno en la komenco de februaro 1537, kie li kompreneble multe laboris, plurajn predikojn faris. Li havis mal-komfortan, ŝim-odoran ĉambron kun malsekaj littukoj, do lia sanstato rapide malboniĝis.

Li ne povis jam partopreni je la preparoloj, kie ankaŭ la deputito de la papo partoprenis.

Spasmo de la reno, fermiĝo de la urina tubo, diareo kaj vomado – la korpa forto tute forlasis lin, eĉ la plej bonaj doktoroj ne povis helpi, eble ĉar eĉ apoteko ne estis en la urbo.

Pro lia peto, per du kaleŝoj de la princo, Luther ekiris hejmen, en unu li kuŝis, en la alia oni tenis varme manĝaĵojn kaj doktorajn ekipaĵojn. Survoje hejmen je iu urbeto li fartis iom pli bone, kaj malfermiĝis la urina tubo, do li povis malplenigi sian (urinan) vezikon. Li skribis pri dia miraklo al Melanchthon kaj al la edzino, sed en la sekvonta tago denove estis fortega rena spasmo kaj li sentis la morton proksime. Do li diktis sian testamenton, ni diru la “unuan” testamenton.

Pri kio temis tiu ĉi unua testamento? En tiu streĉa periodo ne pri la morto kaj pri sia propra vivo, la familio li parolis – sed pri la sorto de la eklezio. Li esprimis sian certecon, ke li bone kaj prave agis, kiam li “atakis” la papoecon, pardonpetis de la plej proksimaj kolegoj – Melanchthon, Jonas kaj Cruciger – se li hazarde ofendis ilin.

Konsolis sian edzinon, dankis ŝin pro ĉio kaj la sorton de siaj malgrandaj infanoj li metis en la zorgon de la plej proksima amika rondo.

Nur kelkajn liniojn li donis en tiu ĉi unua testamento al la familio (ne kiel en la „vera” testamento, kiel ni vidos) kaj poste denove reiris al la granda temo: al la sorto de la eklezio. Li kuraĝigis la princojn, ke ili ne timu kaj ne kredu la akuzon de la papo.

Kiel ni scias, Luther ne mortis. Li resaniĝis kaj venis novaj labor-plenaj jaroj.

Sed en la jaro 1541 Luther denove forte malsaniĝis. Fortega orel- okul- kaj kapdoloroj – skribi, legi, eĉ dormi li ne povis dum longaj semajnoj.

Li denove devis serioze pensi pri sia morto, sed ne nur la malsano estis la kaŭzo, ke li skribu sian testamenton. Eble pli grava estis la honesta, zorgema amo al la fidela, bona edzino kaj lia zorgo pri la sorto de la familio.

Ĉar la alia kaŭzo de la decido, skribi testamenton, estis la jura situacio en la tiama Germanio.

Nun ni logike demandas: ĉu ne estas tute logike, ke la edzino kaj la infanoj heredas ĉion kaj la edzino decidis pri la havaĵoj? Ne, tiam kaj tie ne tiel estis!

Inter tri juroj En Saksio (do en la saksa parto de la Rom-Germana Imperio) estis valida la malnova germana jurlibro, tiel nomata “Sachsenspiegel” – saksa spegulo.

En la 13a jarcento skribis tiun la jur-scienculo kaj kavaliere (Eike von Repgow), kaj vere strange la juro ordonis pri la heredo de geedzoj. Eldiris, ke se la edzo mortas, la domon ne la edzino heredas, sed la infano, aŭ la infanoj. Se ili ne havis infanojn, ankaŭ tiam ne la edzino heredas, sed la plej proksima vira parenco de la edzo.

Laŭ tiu malnova leĝo – kiu daŭre estis valida je la tempo de Luther – la vidvino heredis nur la donacon, kiun ŝi ricevis je la nupta festo kaj la plej malgrandan rondon de la personaj objektoj, vestaĵojn kaj juvelojn. La maksimumo, kiun la edzo povis fari, estis ke li metis dumvivan renton sur la domon aŭ domojn, sed ankaŭ tio nur inter specialaj cirkonstancoj estis valida.

Ankaŭ la infanoj sufiĉe speciale heredis: la pli maljuna disigis la havaĵojn, la pli juna elektis inter la “pakaĵoj”.

La dua juro estis la eklezia juro, kaj la tria la romia juro, kiu pli kaj pli enpenetris la tiutempan juran pensmanieron.

Luther inter 1501 kaj 1505 en la erfurta universitato lernis juron, sciis ĉion, kaj bone sciis, ke la juristoj lerte ludas per la tri diversaj juraj reguloj. Kiel li esprimis sin: “Juristen – böse Christen” – Juristoj, malbonaj kristanoj.

Li ankaŭ ege bone sciis, ke pri la geedzaj kaj heredaj aferoj la plej forta estis la eklezia juro. Kaj ankaŭ tion li

bone sciis, ke li, kiel ekskomunikita kaj malbenita monaĥo simple ne havis rajton fari testamenton laŭ la eklezia juro, kaj la edzino, kiel eskapita monaĥino ne havas rajton heredi.

Li bone sciis, ke lia reformatora agado ankoraŭ ne transformis la juran sistemon, ne ŝanĝis la validajn leĝojn, kaj ke la civilaj kaj la ekleziaj juristoj ankoraŭ ne akceptis tion. Do li bone sciis, ke ili atakos la testamenton, atakos lian rajton lasi heredaĵojn, kaj atakos la rajton de Katharina akcepti heredaĵojn.

Eble povus argumenti per la romia juro, ke la edzino rajtu heredi. Sed per la eklezia juro absolute ne eblis argumenti, ke eskapita monaĥino havas rajton heredi.

Pro tiuj vidpunktoj decidis Luther, ke li tiel skribu sian testamenton, ke oni akceptos la prioritaton de la civila juro antaŭ la eklezia juro.

Li skribis en letero: “Estus bone la tutan eklezian juron, ekde la unua litero ĝis la lasta litero ĝis la radiko ekstermi. La monda juro – kvankam nur Dio scias kiel sovaĝiĝinta estas ankaŭ tio – tamen estas multe pli bona, pli arteca, pli vera, ol la eklezia juro”.

Do per profunda jura scio kaj konscia reformatora kredo li ekzamenis sian situacion. El unu flanko kio estas bezonata al regula testamento, kaj el alia flanko lian malfacilan staton – kaj li decidis skribi “malregulan” testamenton.

Kontraŭ la Saksa Spegulo li donos la prioritaton al la romia juro, ke li povu heredigi al la edzino. Li ankaŭ sentis ke tiu decido estas pli deca laŭ lia reformita vidpunkto pri edzino kaj pri familio. Li decidis, kontraŭ la leĝo, ke li donos la postenon de la zorganto de la infanoj al

la plej taŭga homo: al la patrino.

Li ankaŭ decidis, ke li ne uzos publikan notaron, ĉar se estas “vera” testamento, tiam laŭ la leĝoj li ne havas rajton fari testamenton, kaj tian staton ankaŭ publika notario ne povas ŝanĝi.

Tiu demando restis ankoraŭ malfermita, kiel eblas fari leĝe heredkapabla iun, kiu laŭ la leĝo ne estas heredkapabla. Luther ankaŭ al tiu problemo trovis taŭgan formon: el la romia juro li nomis sian testamentan heredaĵon kiel “donacon aŭ dumvivan renton”. Li bone sciis, ke en tiu ĉi tempo jam ankaŭ en la germana teritorio ne estis malpermesita la donac-donado inter la geedzoj.

Do, pro tiuj multaj vidpunktoj li decidis, ke sen la devigaj juraj formuloj li skribos sian testamenton, do sen publika notario, sen la subskribo kaj sen la ŝtampo de la devigaj sep(!) atestantoj

Li skribos “leteron” en kiu li donacas al la edzino por ĉiama uzado la ĝardenojn, la Bruno-domon kaj ĉirkaŭ mil guldenojn valorajn pokalojn kaj juvelojn, orajn- kaj arĝentajn ringojn, ĉenojn kaj monon. La inventuro estis la unu nura regula parto de tiu ĉi neregula testamento.

Neniu alia reformatoro skribis tiel bele pri sia edzino kiel Luther. Kaj ne nur en sia testamento, kie ni tion legas.

Kiel argumento, kial la edzino heredu ĉion: Unue pro tio, ĉar ŝi kiel pia kaj fidela edzino ĉiam amis min, estimis min kaj zorgis pri mi, donacis al mi kvin vivantajn infanojn kaj zorgis ankaŭ pri ili; due pro tio ke mian ŝuldon ŝi povu pagi; trie kaj plejparte pro tio, ĉar mi tion volas, ke ne ŝi devu vidi la manon

de la infanoj, sed la infanoj vidu ŝian manon, kaj ili respektu ŝin, kiel Dio ordonis, kaj en ŝi multe pli bone eblas fidi ol en kiu ajn notario.

Je la fino de la testamento li belege petegas al la sekvuloj kaj argumentas, ke ili akceptu lian volon: “Ĉar se Dio, la patro de ĉiuj kompatemoj la evangelion de sia ĉarmega filo komisiis al mi, al malbenita, kompatinda kaj mizera kulpulo, kaj en tio faris min sia fidela kaj vera servanto, ĝis nun konservis min kaj trovis min fidela, eĉ pere de mi multaj homoj trovis la vojon al Li, kaj pro tio, ke ili konsideras min la instruisto de la vero, kontraŭ la malbeno de la papo, kaj kontraŭ la kolero de la imperiestro, reĝoj, princoj, pastroj kaj eĉ la kolero de ĉiuj diabloj, do kredu al mi multe pli multe tie ĉi, en tiu ĉi malgranda afero. Precipe ĉar estas tie ĉi mia bone konata manskribo, mi esperas, ke tio sufiĉas por tio, ke diru kaj atestu, ke tiu ĉi estas la serioza kaj bone trapensita volo de doktor Martin Luther (la notario de Dio kaj atestanto de lia evangelio), kiun lia propra mano kaj ŝtampo pravas.

Skribita kaj eldonita je la tago de Epifanio en la jaro 1542”

La atestantoj estis Philipp Melanchthon, Caspar Cruciger kaj Johann Bugenhagen Pomeranus.

En la 1a de februaro 1544 Luther prezentis sian testamenton al la urba juĝisto Hans Luft. Li estis fama wittenberga presisto kaj registris ĝin al la oficiala libro de la urbo. La inventuro estis preskaŭ la ununura regula aldoniĝo de tiu ĉi malregula testamento, kiu ankaŭ


hodiaŭ estas en la arkivo de Wittenberg.

En la 18a de februaro en la jaro 1546, en sia naskiĝurbo, Eisleben – Luther mortis.

Post kelkaj semajnoj Katharina petis al Johano Frederiko princo elektito, ke li konfirmu la testamenton de Luther. Kiel unua paŝo – pro la peto de Katharina von Bora – la princo ordonis zorgantojn al la infanoj: la fraton de Luther, Jacob Luther, dr. Matthias Ratzeberger kortega kuracisto, Ambrosius Reuter urbestro de Wittenberg, kaj kiel anstataŭantojn Melanchthon kaj Cruciger.

La 11an de aprilo Johano Frederiko oficiale konfirmis kaj validigis la testamenton. Eĉ! Li faris ankoraŭ unu geston: laŭ sia antaŭa promeso, li helpis la vidvinon, ke ŝi al la infanoj povu aĉeti malgrandan kavalieran farmon, kiu estis la posedaĵo de la pli frue mortinta amiko de Luther. La grafo de Mansfeld per du mil guldenoj helpis tiun aĉetadon.

Do, kvankam estis jure mankhava la testamento, kaj en la okuloj de multaj homoj estis malregula la testamento, tamen Luther sukcese atingis sian celon: lia familio inter ordigitaj cirkonstancoj povis vivi ankaŭ post lia morto. ☺



Parto de la testamento kun subskribo de M Luther

22-a Ekumena Esperanto Kongreso

estas preparata ankaŭ por Vi – se Vi volas partopreni, rapide aliĝu



Lysá nad Labem

Dum la duontaga ekskurso ni vizitos ankaŭ urbon Lysá nad Labem, kie ni trarigardos, krom aliaj lokoj, paroĥejon de Ĉefhofrata evangelia eklezio. La preĝejo estis konstruita jam en la jaro 1789!! Dekstre lernejo, sube resto de malnova tombejo, interno de la preĝejo kaj paroĥa domo kun enirejo...



Kolínská řepářská drážka

Ovčárecká ulice, Kolín Sendražice

Dum la tuttaga ekskurso ni veturos per nove rekonstruita fervojo. Origine ĝi estis konstruita por transporti la sukerbeton de la kampoj al sukerproduktejo en urbo Kolín jam en la jaro 1894 kaj estis longa pli ol 10 km. Funkciis preskaŭ 70 jaroj kaj poste estis tute detruita kaj nur en la jaro 2007 startis nova etapo.

Aliĝintoj

al 22-a Ekumena Esperanto Kongreso 2018,
Poděbrady, Ĉeĥio

- | | | | |
|-----------------------------|----------|---------------------------|----------|
| 1. Cousson Philippe, | Francio | 2. Ráczkevy-Eötvös Ágnes, | Hungario |
| 3. Åradsson André, | Svedio | 4. Åradsson Bengt Olof, | Svedio |
| 5. Gaillard Samuel, | Francio | 6. Stamm Sieglinde, | Aŭstrio |
| 7. Farkas Antal, | Rumanio | 8. Pospíšil Václav, | Ĉeĥio |
| 9. Pospíšilová Ría, | Ĉeĥio | 10. Polnický Pavel, | Ĉeĥio |
| 11. Beloševič Marija, | Kroatio | 12. Beloševič Krešimir, | Kroatio |
| 13. Oláh Margit Judit, | Rumanio | 14. Popoviciu E. Eugenia, | Rumanio |
| 15. Chrdle Petr, | Ĉeĥio | 16. Feifičová Magdaléna, | Slovakio |
| 17. Petřík Pavol, | Slovakio | 18. Stier Gabriella, | Rumanio |
| 19. Fischer Oldřich Arnošt, | Ĉeĥio | 20. Švábek Miloslav, | Ĉeĥio |
| 21. Dubinová Jindřiška, | Ĉeĥio | 22. Lászlo Maria, | Hungario |
| 23. Šcirt Terezia-Ildiko, | Rumanio | 24. Schaeffer Hedwig, | Germanio |
| 25. Schaeffer Karl Heinz, | Germanio | 26. Klimeš Pavel, | Ĉeĥio |
| 27. Kilijanski Jerzy, | Pollando | 28. Shoyama Mikiko, | Japanio |
| 29. Muto Tacuko, | Japanio | 30. Kikuči Noriko, | Japanio |
| 31. Kovář Jan, | Ĉeĥio | 32. Kepencay Tibor, | Slovakio |
| 33. Szumigaj Henryka, | Pollando | 34. Koncewicz Elżbieta, | Pollando |
| 35. Daminelli Giovanni, | Italio | 36. Hokazono Keiko, | Japanio |
| 37. Duda Zbigniew, | Pollando | 38. Zcavecká Tereza, | Pollando |
| 39. Jania Eugeniusz, | Pollando | 40. Markowska-Jania Anna, | Pollando |
| 41. Bolek Maria, | Pollando | 42. Poraj-Róžecki Józef, | Pollando |
| 43. Latacz Helena, | Pollando | 44. Pomorska Tereza, | Pollando |
| 45. Gowin-Róžecka Irena, | Pollando | 46. Kubicka Mirosława, | Pollando |
| 47. Studený Jiří, | Ĉeĥio | 48. Klumpar Alois, | Ĉeĥio |
| 49. Klumparová Marie, | Ĉeĥio | 50. Karbe Christiane, | Germanio |
| 51. Karbe Norbert, | Germanio | 52. Fossati Tiziana, | Italio |
| 53. Stefański Georgo, | Pollando | 54. Ojasild Endel, | Estonio |
| 55. Ojasild Joonathan, | Estonio | 56. Pachura Elżbieta, | Pollando |
| 57. Cescotti Covelli Norma, | Italio | 58. Truscardo Francesca, | Italio |
| 59. Sorosina Felice, | Italio | 60. Žízalová Marie, | Ĉeĥio |
| 61. Krüger Siegfried, | Germanio | | |

Ne ĉiam enuiu la riĉecon de la aliuloj

Redaktita de Honoré SEBUHORO


Juna kristana fratino en aĝo de 25 jaroj. Dum 7 jaroj ŝi servis Dion en asembleo kiel protokolisto. Ŝi kondukis vivon de preĝo kaj fastado, tre dediĉita al la laboro de Dio. Ŝi ne interesiĝis pri monda vivo aŭ homoj. Ŝi diris al si, ke pli frue aŭ pli malfrue Dio agos en ŝia vivo. Sed ŝia socia vivo estis vere kritikebla. Ŝi havis grandan malfacilaĵon zorgi pri sia korpo, aĉeti vestojn kaj eĉ trovi manĝaĵojn ĉar ŝi estis orfino, do sen patro kaj patrino.

Ŝi pasigis siajn tagojn en la preĝejo. Kaj unu tagon dum kulto, la pastro predikis kiel venki suferadon. Ŝi estis tiel tuŝita de la mesaĝo, ĉar ĉio, kion la pastro diris, estis tiel simila al ŝia ĉiutaga vivo: la manko, mokadoj kaj ridindaĵoj de aliaj. Ŝi rimarkis, ke ŝia vivo estis ĉifono. Ŝi estis tre ruinigita kaj ne povis finaŭskulti la mesaĝon. Ŝi multe ploris kaj decidis ne fini la adoradon kaj reiri rekte hejmen. Ŝi alvenis tre konsternita ĉe la haltejo de la transporto, oni povis vidi spurojn sur ĉi tiuj vangoj kaj ŝiaj okuloj fariĝis tre ruĝaj kriegante: Sinjoro, kion mi faras por suferi tiel?

Subite ŝi vidis belan aŭton kondukita de bela junulino de ŝia aĝo. Ene de ŝi, ŝi estis invadita per sento de kulpeco kaj naŭzo: Kial Dio ne donas al mi la saman vivon? Ŝi diris flustre. Kial ankaŭ mi ne povas esti kiel ĉi tiu virino? Kial ĉi tiu sufero, mi kiu servas kun amo kaj

dediĉo? Post kelkaj minutoj, la aŭto, kiun ŝi enviis tiom multe, turnis sin kaj revenis al ŝi. La ŝoforino, tre riĉa sinjorino proponis preni ŝin hejmen kaj ŝi eniris la aŭton. Ŝi ne ĉesis rigardi la sinjorinon, kiu stiris: bone kongruita, bone parfumita kaj bone vestita. Ŝi reflektis arĝenton kaj lukson ĉefe juvelaĵojn kaj orelingojn. Survoje, la juna virino, kiu veturigis la aŭton, demandas ŝin: ĉu vi scias, kial mi revenis por helpi vin? Ŝi respondas: Ne, mi ne scias! La junulino rakontas al ŝi: kiam mi veturigis, mi vidis vin malproksime kaj via maniero observi min, tio ĉi montras sufiĉe, ke vi min envias kaj volas esti kiel mi. La fratino respondas: jes, mi diris al mi, kial ankaŭ mi ne povas havi ĉiujn tiajn varojn kiel vi! Kaj la juna virino respondas!

Vi scias, ke la aŭto, kiun mi stiras kaj rande, sur kiu vi grimpis, ne estas, kion vi pensas, rigardu malantaŭ vi, kaj en la malantaŭa seĝo de la veturilo, Ŝi havis grandan Python (serpento) kiu estis tie. La juna virino diris al ŝi: Vi vidas ĉi tiun serpenton, mi havas la devon nutri ĝin ĉiutage kun homa sango, mi estis traserĉanta kiel oferi al ĝi la oferon, kaj



vi estis inter la homoj, kiujn mi celis ĉar vi envidis min de malproksime, sed vi havas bonŝancon ĉar sur via kapo, mi vidas markon, kiu indikas, ke vi estas knabino, kiun Dio elektis, mi ankaŭ envias vin pro tio, ke vi havas Jesuon Kriston je via flanko, kiu akompanas vin kaj marŝas kun vi. Mi vidis vian anĝelon kiu blokis movadon de la serpento, ĝi estis tiel morta post kiam vi eniris ĉi tiun veturilon. Sed mi estas kun la serpento, por alporti al ĝi la homan sangon, neniu povas eniri en ĉi tiun aŭton kaj vivi ĉar ĝi estas la domo de la serpento. Ĝi estas la fonto de mia riĉeco. Ŝi diras al ŝi denove! Jesuo Kristo amas vin.

Poste ŝi lasis la knabinon eliri el la aŭto kaj daŭrigis sian vojon. La juna

fratino pleniĝis de timegoj kaj timo, rapide ŝi revenis al la preĝejo beni Dion pro lia ĉeesto en ŝia vivo ...

Frato / fratino, kelkfoje ni havas la impreson, ke antaŭ iuj situacioj, iuj obstakloj kaj certaj malfacilaĵoj, ni pensas, ke Dio forlasis nin, sed Dio neniam forlasis siajn elektitajn. Jesuo Kristo akompanas nin ĉiun momenton.

Dum S:ta Stefano estis persekutata antaŭ ĉiuj, li vidis la Sinjoron staranta sur sia trono dum la aliaj vidis nur la nubon, sciu, ke por via problemo Jesuo Kristo ne sidas, li staras por preni vian aferon kaj protekti vin. Se ĉiuj forlasis vin kaj ne zorgas pri vi, ekzistas Jesuo Kristo, kiu restas via proksima amiko!

☪



Fronta paĝo - iom da klarigo

La ĉeĥa artisto V. Lamr faris interesan kunmetaĵon en sia bildo, kiu kovras nian frontan paĝon. Por mi ĝi aludas al Joh. 3,18 kaj sekvaj versikloj. “*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*”.

Supre ni vidas la stelon kiu anoncis la naskiĝon, sube la *amo*. En la sekva vorto ni facile vidas “*amon*” denove. Tiu amo estas ene de la ĉeĥa vorto *člověk*, kiu signifas homon. Jesuo fariĝis homo por ni, kaj li daŭre por ni, mortis kaj elverŝis sian sangon sur la kruco.

Ĉion vi trovas en la bildo.

Redaktoro

Agado en Neubrandenburg, Germanio

Raportas Werner PFENNIG. DE

Saluton, karaj amikoj, eventuale vi rimarkis en la medioj, ke ne nur la evangeliaj kristanoj en Germanio festis la 500-an datrevenon de komenco de reformacio.

Ankaŭ la Esperanto-amikaro de Neubrandenburg dum unu jaro prezentis dum niaj monataj kunvenoj prelegetojn pri tiu temo. Ni nur celis la lingvan aspekton el la granda temo de reformacio.

La nuntempa germana lingvo ja tute klare estas artefarita lingvo. Novformita el konataj kaj novaj elementoj.

Tiun feston celebris ne nur la protestantoj, sed ankaŭ la katolikoj, ortodoksuloj kaj ateistoj.

Tre kore salutas viaj amikoj el Neubrandenburg.

Permesu, ke mi sendas kelkajn fotojn.

☪

pastro Albrecht tostas
je 500 jaroj reformacio



en publika radio-stacio nia redakcio "Ondo Esperanto", ĝi jam aktivas 20 jarojn. En ĉiu monato oni elsendas 4 horojn de la pri-Esperanto programo, en unu jaro 48 horojn, dum tiuj 20 jaroj do 960 horojn

paĝo el la unua kompleta germana Biblio el la jaro 1534, (fotokopio)



Erden beiligen
 wil nützlich lesen, vnd
 (so ersicht bester hat
 vnd anseigung nicht
 er den titel ober anfang
 ffe / sondern auff
 das er sich nicht düncke / Er verseybe
 nach leiden / das man sagt / Er habbe
 verstanden / schweige denn / den gan-
 ge titel ist fast für eine gloße vnd la-
 buch vnd. Jesaia auch selbsts gleych
 weist / als zu einer anleitunge / vnd
 aber den titel veracht / oder nicht ver-
 propheten Jesaia mit frieden sag-
 stehen werde. Denn es vnmüglich u-
 nung nichtiglich vnd fle sich jnnern
 des Titels gründlich erkentnis.

Den titel aber meine vnd driff
 wort vñsa / Jotham / Abas / Lechias
 verseybe / Sondern für dich nemeß
 gen / vnd das letzte buch der Chroni-
 sonderlich die geschichte / rede vnd sa-
 ter den Königen / die im titel genent
 Bücher / Denn es ist von nöthen / so man
 das man wüßte / wie es im lande ge-
 gen sind gewesen / wes es im lande ge-
 gebabt haben / mit oder gegen ire nachbar / freunde vnd feinde / vnd
 sonderlich wie sie sich jnn irem lande gegen Gott / vnd gegen den Pro-
 pheten jnn seinem wort vnd Gottes dienst oder Abgötterey gehalten
 haben.



dum prelego en nia rondo



21/06/21

man wüßte / wie die Lender an



31/10/2017 1



31/10/2017 11:05

kirko St. Mikaelo, la feste, riĉe dekorita altaro-parto

figuro de Martin Luther, simbolo antaŭ pordo por publiki siajn 95 tezojn

Informoj

Grava atentigo

Estimata redaktoro, bedaŭrinde nur nun mi atentis, ke Dia Regno indikas tute malnovan kaj ne plu ekzistantan konton de **KELI-Germanujo**. Mi petas korekton. Vidu ankaŭ nian retpaĝon: www.esperanto.de/keli

Kun antaŭdanko kaj multaj salutoj

Rudolf Fischer

Nova / ĝusta:

Germanio 24 EUR

Kontoposedanto: Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V.

Konto: Evangelische Bank EG Kassel

IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16 BIC GENODEF1EK1

komisiito por financoj kaj membroadministrado:

d-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a,

D-48356 Nordwalde

0049 2573 626 fischru@uni-muenster.de

Memore al mia frato, István Sigmond, kiu antaŭ kvar jaroj mortis, mi skribis 12 fabelojn. La titolo de la fabellibro estas “Pistike-mesék”, nome “**STEĈJO-FABELOJ**”. Mia frato estis István (Stefano), kiam li estis infano li nomiĝis Pistike (Steĉjo). Li estis verkisto. En decembro 2017 la libro aperis en Kluĵo, en hungara lingvo. Printempe ĝi aperos ankaŭ en Esperanto! Pro tio mi bezonus helpon. Nome, kiu povas kaj volas, tiu bonvolu antaŭmendi ĝin. **1 ekzemplero kostas 5 EŬR**. La sendokoston mi pagos.

Mi estus ege dankema, se vi povus antaŭmendi ĉi tiun fabellibreton! Bonvolu sendi la sumon de 5 eŭroj al mia UEA-Konto: jusi-d.

Nepre menciui: ANTAŬMENDO !

Tutkoran dankon!

Julia Sigmond



William Goldsmith

William (Vilêjo) Goldsmith forpasis la 19an de novembro 2017 je la aĝo de 80 jaroj. Li estis esperantisto ekde la jaro 1987. Profesie li estis misiisto en Bolivio (kvin jarojn), Porto Riko (dek tri jarojn) kaj en la Dominika Respubliko (du jarojn). En Usono li estis pastoro kaj misiisto en suda Teksaso ĉe la landlimo kun Meksiko (dek ok jarojn), kaj pastoro de hispana preĝejo en la ŝtato Arkansaso (sep jarojn). Post lia emeritiĝo, li daŭris en sia studado de Esperanto kaj havis preskaŭ 200 e-poŝtajn amikojn ĉirkaŭ la mondo. Li kontribuis multajn artikolojn al *Dia Regno* dum la lastaj ses jaroj. Lia unua pasio estis instrui la Bibliion, sed lia dua pasio estis Esperanto.

Ellen Eddy



Pierre Ullman

Pierre Ullman mortis la 28an de januaro en sia hejmo en Milwaukee, Usono. Li estis 88-jara. Pierre estis longjara kaj pasia Esperantisto. Li naskiĝis en Nico, Francio, kaj venis al Usono kun sia familio en 1939. Li studis ĉe renomaj usonaj universitatoj kiel Yale, Columbia kaj Princeton, kaj ĉe tiu lasta li doktoriĝis en la hispana lingvo. Dum 30 jaroj li estis profesoro pri hispana literaturo ĉe la Universitato de Viskonsino en Milwaukee. Li aparte interesiĝis pri literaturo en Esperanto kaj li tradukis verkojn de Marjorie Boulton, Brendon Clark kaj aliaj. Li estis membro de KELI kaj ĝis la fino de sia vivo fidela leganto de *Dia Regno*.

Jerry Veit

Saltu gaje mia kor'

(originale verkita en Esperanto)



1. Sal - tu ga - je mi - a kor', mi en Vi ju - bi - las.
Gran - da es - tas Vi - a glor', ĝi en mi re - bri - las.



Vi tra nokt', ne - bul' aŭ brum' gvi - dos min per Vi - a lum'.



Sal - tu ga - je mi - a kor', mi en Vi — ju - bi - las.

2. Plene Vin fidante, mi / tra la vivo vojas,
fidas malgraŭ ve' kaj fi', / kaj en Vi mi ĝojas.
Via lum' heligos min, / Via glor' plenigos min.
Plene Vin fidante, mi / tra la vivo vojas.

SALTU GAJE MIA KOR' • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2017-12-29

La unuaj kvin notoj estas identaj kun tiuj de la germana kristnaska kanto «Still, still, still, weil's Kindlein schlafen will», KANTU 53.